

Kultura Centro Esperantista eniras novan labor-fazon, 2-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 560, 1974.07.03 & 06

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Nuntempe Kultura Centro Esperantista dissendas nacilingvajn informilojn por vastskale informadi pri la efektivigita laboro kaj pri diskonindaj projektoj. Jam la pasintan semajnon ni profitis tiun okazon por raporti pri la aktiveco de tiu centro. Interalie ni diris, ke dank'al subvenciado de la urbo La Chaux-de-Fonds Kultura Centro Esperantista povas starigi en tiu urbo sian konstantan sekretariejon kaj gastigejon por nesalajrataj kunlaborantoj. Inter la plenumaĵoj ni raportis pri la eldono de informfolioj kaj dokumentuoj, pri la dissendado al deputitoj de informbultenoj, pri la funkciigo de bone provizita libro-servo kies profito servos al la kreo de migranta ekspozicio, pri la kreo de korektadaj servoj por franc- german- kaj ital-lingvanoj kaj fine pri la regula organizado de pedagogiaj seminarioj.

A.- La eksperimenta enkonduko de Esperanto en la lernejojn estas unu el la celoj de Kultura Centro Esperantista. En kunlaboro kun interkantona instituto por pedagogia serĉado, kies franclingva nomo estas **Institut romand de recherches et de documentation pédagogiques** kaj kies sidloko troviĝas en la urbo Neuchâtel, Kultura Centro Esperantista nun pretigas proponon por eksperimenta kaj kunordigita instruado de Esperanto en lernejoj de la 4-lingvaj regionoj de Svislando. La direktoro de la ĵus citita instituto **Institut romand de recherches et de documentation pédagogiques**, sinjoro Samuel Roller, akceptis ludi la rolon de teknika konsilanto profite al tiu propono kaj al ĝia posta efektivigo. Sinjoro Claude Piron, instruŝarĝito ĉe la Ĝeneva Universitato en la kadro de la pedagogia instituto **Ecole de Psychologie et des Sciences de l'Education**, ludos la rolon de scienca konsilanto profite al tiu propono kaj al ĝia posta efektivigo. Iom pos tiom tre preciza raporto estas verkata. Ĝi estos sendita al la 25 Instrudepartementoj de Svislando. Ni ne forgesu, ke Svislando estas federacio de 25 suverenaj ŝtatoj, kiuj rilate al instruado estas absolute memstaraj.

Cl.- Paralele al la redaktado de tiu raporto, Kultura Centro Esperantista pretigas la necesan instrumaterialon. Al tiu tasko laboras sinjoro Olivier Tzaut, sekretario de instruista societo : **Société jurassienne de travail manuel et de réforme scolaire**, kaj mi mem.

A.- Ekde aŭtuno 1971 Kultura Centro Esperantista komencis organizi en Renens apud Lausanne semajnfinaĵajn renkontiĝojn sub la nomo Kultura Semajnfino Esperantista. Ni jam havis plurfoje la okazon raporti pri tiuj aranĝoj, kiuj grupigas okdekon da personoj kaj estas karakterizataj de la samtempa disvolviĝo de 4 paralelaj programoj : unu por la esperantistoj, unu por la komencantoj, unu por la neofitoj kaj fine unu por la infanoj. Tiu formulo montriĝis ege pozitiva, kaj nun aliaj organizaĵoj komencis imiti Kulturan Centron Esperantistan organizante similajn aranĝojn.

Cl.- Ne ĉiam estas facile trovi sufiĉan nombron da kunlaborantoj por organizi kvarprograman renkontiĝon. Sed se ilin oni kapablas trovi, tio signifas, ke pluraj personoj lertiĝas en la gvidado de laborgrupoj, ke pluraj personoj ekkuraĝas transpreni respondecon. La konsekvenco estas formiĝo de dinamisma etoso. Franclingva Svislando nun rikoltas la fruktojn de tiu dinamismo : multiĝis la nombro de la esperantistoj, altiĝis la lingvo-nivelo en la laborrondoj, aperadas longaj artikoloj pri esperanto en regionaj kaj fakaj gazetoj.

A.- Ekde aŭtuno 1974-a Bazelo estos elektita por la aranĝado de Kultura Semajnfino, kaj ni esperas, ke tio havos la saman pozitivan rezulton en germanlingva Svislando, kie la

esperanto-movado bedaŭrinde estas stagnanta kaj ne sufiĉe konata. En itala Svislando jam pasintan aŭtunon Tiĉina Esperanto-Ligo en kunlaboro kun KCE organizis Kulturalan Semajnfinojn, kiu havis grandegan sukceson kaj multe paroligis pri nia lingvo en la gazetaro, radio kaj televido.

Cl.- Ĝuste la ĵurnalistojn ni devas regule kontakti. Bedaŭrinde tio ne estas tre facila. Tro ofte organizaĵo streĉas siajn fortojn por anonci renkontiĝon. Kaj oni povas konstati, ke multaj gazetoj tre volonte aperigas tiujn informojn. Sed poste la aranĝo mem alportas tiom da laboro al la organizantoj, ke ili ne plu havas la fortojn por refoje kontakti la ĵurnalistojn kaj akurate sendi kunven-raporton. Ankoraŭ nun por Kultura Centro Esperantista tiu ĵus menciita problemo de la rilatoj kun la gazetoj, radio kaj televido restis nur parte solvita.

A.- Kultura Centro Esperantista konsideris kaj daŭre konsideras tiujn kulturajn semajnfinojn kiel ekzercadon al la aranĝado de ankoraŭ pli kompleksaj renkontiĝoj. Unu el la celoj de KCE estas la starigo de **Internacia FERIA Altlernejo**. De sia kreo en 1968 Kultura Centro Esperantista streĉas siajn fortojn por povi almenaŭ jam sur provizora bazo organizi feriajn kursojn de Esperanto kaj tre fakajn kursojn en esperanto. Post kvin-jara laboro montriĝas, ke eblas baldaŭ organizi la unuan kurssesion. Ĝi okazos en La Chaux-de-Fonds en julio 1975. Pri ĝia programo kaj pri la estonteco de tiu **Internacia FERIA Altlernejo** ni detale raportos la venontan semajnon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!